Pri: rezulto de la invitoj al kunlaboro por baza terminaro pri konstrua varmteĥniko

Rotterdam, 2010-6-27

Estimataj Lars Sözüer, d-ro Hans Kasselmann kaj Jan Werner,

Bonvenon!

Je 2010-4-22 Jan kaj mi dissendis invitojn al kunlaboro por baza terminaro pri konstrua varmteĥniko bazita sur ISO 7345. Ni havis 18 nomojn de personoj, plej parte trovitajn en la Jarlibro de UEA. Ili estas precipe fizikistoj. Je 2010-6-3 ni dissendis rememorigajn mesaĝojn. En la letero de 2010-4-22 ni promesis ĉirkaŭ la dudeka de junio raporti pri respondoj.

Ĝis nun entute 8 respondis. El ili, 3 diris rekte, ke la temo estas ekster ilia sperto aŭ scipovo. Unu respondinto diris, ke li nun ne havas tempon, sed eble havos post sia pensiiĝo ekde 2011. Kelkajn invitilojn mi sendis per papera poŝto; de samvilaĝano mi ricevis poŝtkarton, ke la invitito translokiĝis al Usono kaj certe ne povos helpi. Alia invitito plusendis la mesaĝon al iberia-esperantistaro@yahoogroups.com, sed li mem ne respondis, ĉu jes aŭ ne li ŝatus kunlabori; mi supozas, ke ne.

Nur du invititoj respondis pozitive kaj ---tio ŝajnas al mi--- entuziasme.

Lars, vi skribis, ke nun vi estas tre okupita, sed eble baldaŭ vi havos pli da libertempo. Mi tre ĝojas, ke vi volas kunlabori! Se mi bone memoras, vi iam kunlaboris al astronomia terminaro (http://at.komputilo.org/): do vi havas certan terminologian sperton. Mi pensas, ke vi ankaŭ estos atuto pro via scipovo de lingvoj (germana, turka, ...). Krome, vi kaj mi plurfoje renkontiĝis en diversaj esperantaj (plejofte junularaj) aranĝoj. Eble, ankaŭ tio ĉi instigis al via pozitiva respondo.

Mi sugestas al vi Lars, ke, kiam vi havos tempon, vi trankvile traktos la tekstojn, kiuj estis aldonitaj al la invitilo de 2010-4-22, kaj kiuj troviĝas je http://fabien.galerio.org/varmo/ . Vidu ankaŭ la «unuan taskon» ĉe la invitilo.

D-ro Kasselmann, mi tre kore dankas al vi pro via afabla letero, kiu (paperpoŝte) alvenis al mi je la 22a de junio. Ĝi estis tre plezuriga surprizo, ĉar je tiu dato mi ne plu atendis respondojn --- mi eĉ jam skribis al Lars kaj Jan, ke nur unu invitito (nome Lars) respondis. Mi ĝojas, ke vi bone sukcesis kompreni ĉiujn preparitajn tekstojn. Jes, viaj rimarkoj estas tre utilaj al mi. Mi nun ne respondos al ili, ĉar mi traktos ilin ĉirkaŭ septembro, kiam mi eventuale havos unuajn rimarkojn de Lars. Plue, mi sincere dankas vin pro via mondonaco. Mi ne bone scias kion fari: la Konstruforumo ja ne havas proprajn monrimedojn, sed aliflanke al ĝi ne mankas mono, sed precipe homforto. Do, ankaŭ via plua partopreno estos tre aprezata. Se vi trovos pliajn rimarkojn en la senditaj tekstoj, bonvolu komuniki ilin al mi.

Bedaŭrindas, ke nur du esperantistoj respondis pozitive. Mi pensas, ke parte ni serĉis per malrekta vojo (delegitoj de UEA ne povas ĉion scii aŭ povi). Aliflanke, iuj invititoj, kiuj vere studis fizikon, tro modeste pensas, ke la temo estas ekster ilia scipovo. Ili eble ne konscias, ke multaj nocioj de la konstrua varmteĥniko ne aŭ malmulte superas la nociojn, kiujn oni kutime traktas en mezlernejoj preparantaj al universitataj studoj. Plue, aliaj fizikistoj estas mallogitaj de varmteĥniko aŭ konstrufiziko, ĉar tio ĉi estas «malneta aŭ tro praktika versio» de fiziko, do io nefundamenta kaj io konfuziga. La apliko kaj celo de nocioj en la konstrua varmteĥniko

foje povas esti misteraj al ordinaraj fizikistoj, sed konstruistoj bezonas foje specifajn nociojn, ĉar ili celas ekzemple normigi kalkulmetodojn (por evalui energiŝparadon de domo).

Malgraŭ ĉi ĉio, mi ŝatus ankoraŭ unu fojon provi arigi pli da kunlaborontoj. Ĉu vi havas sugeston al mi?

Ĉar ĝis nun ni havas nur du (eventualajn) kunlaborontojn, la progreso de la kunlaboro kompreneble dependos de vi du. Bonvolu informi min pri viaj progresoj. Ĉiuokaze mi provos rekontakti vin per letero aŭ retmesaĝo ĉirkaŭ septembro. Se la kolektivo restos tiom malgranda, ni povos pli facile komuniki kaj interŝanĝi ideojn poe kaj rekte (sen kvazaŭ oficialaj cirkuleroj).

Estimataj Lars kaj Hans, sentu vin bonvenaj. Mi tre scivolas pri viaj kontribuoj al la projekto.

Salutas sincere,

Fabien van Mook, Nederlando